# *Premio iberoamerika de kino por Kubo*



La iberoamerika premio de kino  Fénix, estis donita en ties unua eldono al la internacia festivalo havana de la nova latinamerika kino pro ties enorma kontribuo al la evoluo kaj disvastigo de la regiona kinoarto kaj formado de spektantaroj.

La laboro plenumita dum pli ol tri jardekoj flanke de teamo kapita hodia? de Iván Giroud, en kiu pluvivas la animo de ties fondinto Alfredo Guevara kaj aliaj elstaruloj kiel Santiago Álvarez kaj Gabriel García Márquez,  meritas je rekono  tial ke la kulturo estas vojo kiu ebligas proksimi?on kaj interkonati?on, la? deklaris la organizantoj de la premiado.

La premiado estos festo anta? la jam proksima nova eldono de la havana festivalo kaj alia motivo por stimuli la preparadon faratan de la organiza komitato.

La 36-a eldono de la festivalo, okazonta inter la 4-a kaj 14-a de decembro estos dedi?ita al García Márquez.

Organizita de Cinema 23, asocio de elstaraj kinofaristoj kaj specialistoj, la premio Fénix rekonas kaj celebras la laboron de la kinofaristoj en Latinameriko kaj la Ibera Duoninsulo, kaj ties ceremonio okazos en Meksiko.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/37866-premio-iberoamerika-de-kino-por-kubo

**Radio Habana Cuba**